

N. N. 32,  
En rose så jeg skyde  
*tradukita de Thomas Laub*

En rose så jeg skyde  
op af den frosne jord,  
alt som os fordum spåde  
profetens trøsteord.  
Den rose spired frem  
midt i den kolde vinter  
om nat ved Bethlehem.

For rosen nu jeg kvæder  
omkap med Himlens hær:  
en jomfru var hans moder,  
Maria ren og skær.  
I ham brød lyset frem  
midt i den mørke vinter  
om nat ved Bethlehem.

Den rose fin og lille  
har dejlig duft og skær,  
den lyse for os ville  
og sprede mørket her.  
I sandhed mand og Gud,  
af syndens nød og pine  
han nådig hjalp os ud.

N. N. 32,  
Elkreskis rozbranĉeto  
*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
el rozarbust' de Di'.  
Aŭguro de profeto  
rakontis jam pri ĝi.  
Naskiĝis rozfloret'  
meze en vintra nokto  
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
Jesaj' prognozis ĝin -  
el sia korpo sproson  
Mari' la virgulin'.  
Laŭ dipotenza vol'  
si naskis Di-infanon  
por tutu mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto  
tre hele lumas ĝi.  
Obskuron la brileto  
forprenas nun de ni.  
Vi hom' kaj vera Di'  
el pekoj kaj suferoj  
estas savant' por ni.

N. N. 32,  
Burĝonis rozarbedo  
*tradukita de Guido Holz*

1. Burĝonis roz-arbedo  
el delikata sin'  
laŭ olda kant-heredo,  
Jišaj la origin';  
ekĝermis ĉarma flor'  
dum frosta vintro-tempo  
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,  
mirinda roz-arbed',  
elvenis flor' benata  
laŭ diro de profet'.  
Laŭ sankta Di-ordon'  
si naskis infaneton  
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,  
amindas per parfum';  
la nokton ĝi forpelas  
per sia brila lum',  
nin helpas el mizer',  
el pek' kaj morto savas;  
Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

...

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingebo.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: [http://da.wikisource.org/wiki/En\\_rose\\_s%C3%A5\\_A5\\_jeg\\_skyde](http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_A5_jeg_skyde) kaj [http://www.ugle.dk/en\\_rose\\_saa\\_jeg\\_skyde.html](http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html). Pri Thomas Laub vidu la retejn [http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Laub](http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub).

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).